UNUA JARO. — Nº 4. Unu Numero : 10 CENTIMOJ. DIMANĈO 30 JULIO 1905. · ESPERANTO ·

★ ESPERANTO ★

PROPAGANDA JURNALO POR LA LINGVO HELPA INTERNACIA

DE L. L. ZAMENHOF

ADMINISTRADO : Sº Paul BERTHELOT CÉRET (P.-O.) Francoi.

Nenian manuskripton sendu al la Administranto.

REDAKTADO : Sº Ch. LAMBERT 10, str. Berbisey, DIJON (Côte-d'Or), Francoi.

Nenian administraĵon sendu al la Redaktejo.

ABONOJ 24 numeroj sinsekvaj : 3 fr. por la tuta mondo. 10 abonoj je la sama adreso : 24 fr. nur en Franciando.

REKLAMO-ANONCOJ Agento Ĝenerala : Sº EMILE GASSE 51, Phalsbourg, LE HAVRE (Seine-Inférieure).

La numero **5** *de* **Esperanto** *eliros DIMANĈO 6 AŬGUSTO.*

TUTMONDA LIGO ESPERANTISTA

PROJEKTOJ

PREZENTOTAJ AL LA KONGRESO

Letero kaj projekto de Dro Zamenhof

(SEKVO)

Ne sole la libera disvolviĝado de nia afero, sed eĉ mia persona laborado por nia afero multe suferas de tio, ke ne ekzistas ia plej alta juĝantaro. Tre ofte oni petas min, ke mi donu *oficiale* novajn vortojn, regulojn k. t. p. ; mi tamen nenion povas fari, ĉar ĉiu simila paŝo de mia flanko estus arbitraĵo kaj elvokus grandan kaj ĝustan malkontentecon, senfinan disputadon kaj malpacon. Sed, se ekzistos ia plej alta institucio, elektita de la tuta esperantistaro, tiam miaj manoj estos liberigitaj, kaj ĉion kion mi trovos utila, mi povos kuraĝe proponi al la decido de tiu instituco, kaj ĉio, ĉion tiu instituco decidos, povos esti kuraĝe farita, kaj neniu havos la rajton protesti aŭ disputi.

Pro ĉiuj supre montritaj kaŭzoj, mi decidis proponi al la esperantistoj ke ili fine kreas al si ian institucion, kiu estos periode reelektata de la esperantistoj mem kaj prezentos plej altan juĝantaron por ĉio, kio koncernas nian aferon. Tiu ĉi instituco estos la « Centra Komitato » pri kiu mi parolos malsupre. Sed ĉar la « Centra Komitato » devas esti elektata de ĉiuj esperantistoj, tial estas necese ke la esperantistoj antaŭe unuiĝu kaj organiziĝu. Tian organizacion mi volas nun proponi sub la formo de « Tutmonda Ligo Esperantista ».

* * *

Malsupre mi donas la projektatan de mi regularon de la Ligo kaj mi petas ke ĉiuj esperantistoj volu bone pripensi kaj priĵuĝi en siaj grupaj kunveno j tiun ĉi regularon, ĉar en la Kongreso en Boulogne-sur-Mer mi intencas proponi tiun ĉi regularon al la voĉdonado de la kongresanoj. Nun mi volas nur fari la sekvantan rimarkon : intencante proponi al la Kongreso mian projekton, mi *tute ne deziras* ke mia projekto estu la sola en la Kongreso ; kontraŭe mi estos tre ĝoja se ankaŭ aliaj esperantistoj ellaborus projektojn de organizacio kaj prezentus ilin al la Kongreso por ke ni povu elekti. *Forte eraras* tiuj esperantistoj, kiuj pensas, ke ili faros al ni agrablaĵon se ili forprenos ĉiun alian projekton krom la mia, aŭ ke ili faros al mi malagrablaĵon se ili akceptas ian alian projekton anstataŭ la mia. Mi estas tre malbona organizisto kaj mi prenis sur min la ellaboron de organizacia projekto *nur tial*, ĉar mi timis ke aliaj, pli lertaj personoj tion ĉi ne faros. Se pro foresto de alia pli bona projekto oni decidos akcepti mian, tiam mi tute ne deziras, ke oni ĝin akceptu blinde kaj senkritike ; kontraŭe, ju pli oni kritikos kaj plibonigos mian projekton, des pli kontenta mi estos ; mi deziras nur ke la kritikado estu ne negativa, sed pozitiva, t. e. ke la kritikantoj ne limigu sin per simpla sencela malŝatado, sed ke anstataŭ ĉio malbona ili proponu ion *pli bonan* precizan kaj facile akcepteblan per voĉdonado ; tiam mi povos esperi ke la priĵuĝado de la afero en la Kongreso donos al ni efektive ian bonan kaj fortikan organizacion esperantistan.

La ĉefa ideo de mia tuta regularo estas : « Ni devas havi Centran Komitaton kiu estos elektata de la esperantistoj mem kaj tenos en sia manoj la tutan sorton de nia afero. » Ĉiuj aliaj paragrafoj de mia Regularo estas nur provizoraj kaj tre facile povos esti ŝanĝitaj, elĵetitaj aŭ alplenigitaj per la decidoj de la Centra Komitato mem. Sekve kvankam mi mem konfesas ke mia proponata Regularo estas ne perfekta, tamen la esperantistoj tute ne devas timi, ke akceptante ĝin (se aliaj personoj ne proponas ion pli bonan) oni ricevos ian danĝeron : ĉar nia Regularo donas al la Centra Komitato *plenan liberecon*, tial ĉio, kio en mia Regularo montriĝos nebona povos tre facile kaj en ĉiu tempo esti ŝanĝita, elĵetita aŭ alplenigita. Ĉiuj paragrafoj de mia Regularo, se ili en la nuna aŭ la ŝanĝita formo estos akceptitaj de la Kongreso, devos nur servi kiel *provizora gvido* por la Centra Komitato ĝis tiu tempo, kiam la Komitato mem ellaboros al si gvidon kaj regularon pli bonan.

* * *

Mi estas konvinkita ke la Centra Komitato elektita inter la plej serioza j, kompetentaj kaj sindonaj esperantistoj faros nenian facilaniman kaj ne sufiĉe pripensi ian paŝon, kiu povus malutili al nia afero. Sed ĉar la komitatanoj estos nur homoj kaj povos erari, tial por eviti ĉiun danĝeron, mi aranĝis la regularon tiamaniere ke super la decidoj de la Centra Komitato ekzistos ankoraŭ ĉiujara Kongreso kiu en okazo de bezono havos la rajton nemiigi la decidojn de la Komitato, se tiuj ĉi decidoj montriĝos danĝeraj ; ĉiu esperantisto sekve havos ĉiam la plenan eblon frutempe agitadi kaj averti la esperantistaron kontraŭ ĉiu decido de la Komitato, kiu ŝajnos al li danĝera, kaj li povos havi la certecon, ke se lia opinio estas efektive ĝusta, ĝi certe venkos.

Mi havis la intencon antaŭ la publikigo dissendi mian projekton al kelkaj plej gravaj esperantistoj, por konsiliĝi kun ili (al kelkaj el ili mi eĉ promesis tion siatempe) ; sed ĉar mi timis, ke tio ĉi tro malfruigus la publikigon de la projekto, kaj ĉar mi publikigas nur ne mian *decidon*, sed nur mian *intencon*, kiun mi ĝis la Kongreso povas ja ankoraŭ ŝanĝi, se la diritaj personoj montros al mi iajn gravajn erarojn en mia projekto, tial mi decidis ne perdi nun tempon por tro longa korespondado kun *apartaj* personoj, rezervante al mi tamen la rajton fari ankoraŭ en mia projekto diversajn ŝanĝojn, se tio ĉi montriĝos necesa.

ZAMENHOF.

I

PROJEKTO DE REGULARO

1. — La Tutmonda Ligo Esperantista havas la celon disvastigadi en la mondo la uzadon de la lingvo internacia « Esperanto » kaj solvadi ĉiujn dubojn, kiuj povas aperi pri diversaj punktoj de la lingvo kaj pri la manieroj de ĝia disvastigado. La Ligo estas la plej alta kaj decidanta aŭtoritato en ĉiuj aferoj koncernantaj la lingvon Esperanto, kaj ĉiuj decidoj de la Ligo estas devigaj por ĉiuj esperantistoj egale, ne esceptante ankaŭ la aŭtoron de la lingvo Esperanto.

2. — Membro de la Ligo estas ĉiu persono kiu abonas la « Centran Organon de Esperanto » eldonatan de la Ligo. La Centra Organo eliradas sub la redakcio de la sekretario de la Ligo unu fojon en monato en amplekso ne konstanta, depende de la kolektiĝanta kvanto da oficiala materialo. Ĝia kosto estas 3 frankoj por jaro kaj la tuta mona profito de tiu ĉi organo apartenas al la kaso de la Ligo. La adresoj de ĉiuj membroj de la Ligo estas presataj en la Centra Organo.

Rimarko. — Atingado de membreco de la Ligo per simpla abonado de la Centra Organo estas aranĝita kun tiu celo, ke la apartenado al la Ligo ne estu malhelpata de la leĝoj de tiu aŭ alia lando.

3. — Ĉiu membro, kiu deziras partopreni aktive en la aferoj de la Ligo devas aliĝi al la Grupo Esperantista, ĉar rajton de voĉo havas ne apartaj personoj, sed nur la grupoj. Rajton de voĉo en la aferoj de la Ligo havas ĉiu grupo esperantista, kiu enhavas en si ne malpli ol 10 membrojn de la Ligo. Ĉiu grupo havas tiom da voĉoj, kiom da dekoj da membroj de la Ligo ĝi posedas.

4. — La ligo estas regata de « Centra Komitato », kiu estas ĉiujare elektata en la Kongresoj esperantistaj en la sekvanta maniero : lando, en kiu ĉiuj grupoj esperantistaj estas ligitaj inter si en formo de komuna landa societo, konsistantis el ne malpli ol 100 ligorajtaj membroj elektas en sia antaŭkongresa komuna kunveno reprezentantojn po unu persono por ĉiu plena cento de siaj ligorajtaj membroj kaj prezentas la nomojn de tiuj elektitoj al la Kongreso, kiu akceptas ilin (se ne aperas gravaj protestoj) kiel membrojn de la Centra Komitato por la venonta jaro kaj publikigas iliajn nomojn kaj adresojn en la plej proksima numero de la Centra Organo. Landoj, kiuj ne havas propran landan organizacion esperantistan, aŭ havas organizacion kies nombro da ligorajtaj membroj estas malpli ol 100, ligigas inter si en la Kongreso kaj per komuna interkonsentaĵo de siaj delegitoj ili elektas po un reprezentanto por ĉiu plena cento da siaj kunekaŭkulitaj ligorajtaj membroj. La nombro de la membroj de la Centra Komitato devas esti 25 ; tial se la nombro da elektitaj reprezentantoj estas malpli ol 25, la kongreso alelektas la mankantan nombron, kaj se la nombro da elektitaj reprezentantoj estas pli ol 25, tiam la reprezentantoj mem per voĉdonado elektas inter si 25 personojn por la Komitato. Tuj post sia formiĝo la Centra Komitato elektas al si mem prezidanton en la persono de unu el siaj membroj, kaj tiu ĉi persono fariĝas prezidanto de la Ligo.

5. — Unu fojon en ĉiu jaro estas farata Internacia Kongreso Esperantista, kies loko kaj tempo estas decidata en la antaŭirinta Kongreso. Ĉiu ligorajta grupo esperantista sendas al la Kongreso siajn delegitojn, kiuj devas havi la aĝon de ne malpli ol 21 jaroj kaj prezenti al la organizantoj de la Kongreso rajtigan leteron subskribitan de ĉiuj personoj, kiuj ilin rajtigis. Ĉiu grupo esperantista havas la rajton sendi al la Kongreso po unu delegito por ĉiu plena deko de siaj membroj kiuj pagis por tiu ĉi jaro sian kotizaĵon al la Ligo kaj estas publikigitaj en la Centra Organo. Grupoj, kiuj ne povas sendi al la Kongreso sian delegiton, povas transdoni siajn voĉojn al ia alia esperantisto, kiu veturas al la Kongreso.

6. — La Centra Komitato estas la plena mastro kaj plej alta juĝantaro en ĉiuj demandoj koncernantaj la taskon de la Tutmonda Ligo Esperantista. Ĉiuj decidoj de la Centra Komitato estas faratoj en la sekvanta maniero : se iu membro de la Ligo deziras akiri por io la decidon de la Centra Komitato, li turnas sin al sia grupo, kaj se tiu ĉi lasta aprobas lian proponon, ĝi dissendas ĝin al ĉiuj membroj de la Centra Komitato kune kun poŝta marko por ilia respondo. Sur la ricevita propono ĉiu membro de la Komitato skribas sian opinion per « jes » aŭ « ne » kaj resendas la respondon al la esperantista grupo. Se pli ol duono de la membroj de la Komitato respondis per « jes » tiam la grupo farinta la proponon, sendas ĝin kune kun la subskribo de la membroj de la Komitato al la sekretario de la Ligo, kaj tiu ĉi publikigas la envon de la propono en la plej proksima numero de la Centra Organo kiel « decidon de la Centra Komitato. »

7. — Ĉiuj decidoj de la Centra Komitato havas en la komenco nur signifon *provizoran*. En la plej proksima Kongreso ĉiuj decidoj de la Komitato faritaj en la daŭro de la pasinta jaro, estas prezentataj al la voĉodonado de ĉiuj delegitoj de la grupoj esperantistaj ; kaj nur tiam kiam la delegitoj per plimulto da voĉoj akceptas la decidon, ĝi ricevas jam definitivan sankcion, kiel « decido de la Ligo ». Por ke ĉiuj delegitoj, partoprenantaj en la Kongreso, havu la eblon bone pripensi en siaj grupoj ĉiun proponon, decidotan en la Kongreso, oni voĉdonas en la Kongreso nur pri tiuj decidoj de la Centra Komitato, kiuj estis publikigitaj en la Centra Organo ne malpli ol 3 monatojn antaŭ la komenco de la Kongreso.

8. — La Centra Komitato okupas sin nur je tiaj demandoj, kiuj ne povas esti solvataj de la specialaj komitatoj, ekzemple : ŝanĝoj en la Regularo de la Ligo, demandoj pli plibonigoj en la lingvo, plendoj de apartaj grupoj kontraŭ la ago de iu aŭ alia speciala komitato k. t. p. Sed je la kurantaj, *konstantaj* aferoj de la Ligo okupas sin komitatoj *specialaj*, kiuj kondukas siajn aferojn tute memstare (se la Centra Komitato ne donas al ili specialajn instrukciojn) kaj nur ĉiujare prezentas al la Kongreso siajn raportojn, petante ilian aprobon de la Kongreso. La specialaj komitatoj estas ; Komitato de Agado, Komitato de la Lingvo, Komitato de Kongresoj, Komitata de Cenzuristoj, Komitato de Ekzamenistoj.

9. — La Komitato de Agado okupas sin je la praktika plenumado de ĉiuj decidoj de la Ligo kaj je la kondukado de ĉiuj kurantaj praktikaj aferoj de la Ligo. La prezidanto kaj vicprezidanto de la Komitato de Agado estas nomataj sekretario kaj vicsekretario de la Ligo. Ĉiuj membroj de la Komitato de Agado devas loĝi en unu urbo. La Komitato de Agado eldonadas la Centran Organon de la Ligo kaj administras la kason de la Ligo.

10. — La Komitato de Agado jam de si mem aranĝas kaj konstante kontrolas diversajn *sekciojn* por diversaj funkcioj, ekzemple :

a) *Sekcion de Propagando* kie koncentriĝados el la tuta mondo diversaj projektoj de propagandaj rimedoj kaj ilia pripensado, priĵuĝado kaj plenumado kun interkonsento kaj helpo de ĉiuj grupoj esperantistaj ;

b) *Sekcion de Informoj* al kiu ĉiuj grupoj esperantistaj sin turnados kun sendado kaj petado de diversaj informoj ;

c) *Sekcion de Librovendado* kie estos la centra vendejo por ĉiuj verkoj esperantistaj kaj abonejo por ĉiuj gazetoj esperantistaj ; tiu ĉi sekcio numerados kaj katalogados ĉiujn aperantajn verkojn en aŭ pri Esperanto. k. t. p.

Rimarko. — La sekcioj de la Komitato de Agado devas alportadi al la diversaj landaj societoj esperantistaj nur *helpon*, sed severe evitadi ĉian *konkuradon* kun ili.

11. — La membroj de ĉiuj aliaj specialaj Komitatoj povas loĝi en malsamaj urboj ; ili estas elektataj en la sekvanta maniero : ĉiujn membrojn por la unua jaro elektas la aŭtoro de Esperanto ; en ĉiu sekvanta jaro ĉiu Komitato mem eligas 1/3 de siaj membroj (reelektebla) kaj anstataŭigas ilin per aliaj, per voĉdonado, aranĝita en monatojn antaŭ la Kongreso, de la komitata prezidanto, kiu sendas al ĉiu membro la nomaron de ĉiuj personoj kiuj esprimis al li la deziron eniri en la Komitaton. La rezultato de la voĉdonado estas prezentata por aprobo al la Kongreso.

12. — La Komitato de la Lingvo okupas sin je la solvado de ĉiuj duboj, kiuj aperas pri la ĝusta senco de tiu aŭ alia vorto, pri la uzado de tiu aŭ alia esprimo en Esperanto aŭ pri la akceptebleco de tiu aŭ alia vorto nova (kiun la Komitato sen decido de la Ligo povas tamen nur rekomendi, sed ne oficialigi). La Komitato havas la rajton decidi nur pri punktoj « dubaj », sed ne fari ian « ŝanĝon » en la lingvo (la rajton fari ŝanĝojn, se tiaj montriĝus efektive « necesaj », havas nur la Kongreso, post antaŭa decido de la Centra Komitato kaj post 3-monata publikiteco de tiu decido laŭ la paragrafo 7). La Komitato de la Lingvo konsistas el 15 personoj, kiuj devas posedi bone la lingvon Esperanto. Ĉiu esperantisto, kiu havas ian dubon pri vorto aŭ regulo, prezentas demandon pri ĝi al sia grupo ; se la grupo ne povas doni respondon kaj se ĝi trovas la demandon sufiĉe grava, ĝi sendas ĝin (kun pagita respondo) al ĉiuj 15 membroj de la Komitato de la Lingvo kaj la ricevitajn respondojn ĝi transsendas al la prezidanto de la Komitato kun la peto, ke li publikigu la decidon de la plimulto en la Centra Organo de la Ligo. En okazo de tro granda diferenco de opinioj, kiu faras la decidon ne ebla, la prezidanto de la Komitato denove proponas la demandon (kune kun la ricevitaj opinioj) al la voĉdonado de la membroj kaj se ankaŭ tiam la voĉoj estas tro malsamaj, tiam decidas la voĉo de la prezidanto.

13. — La komitato de Kongresoj zorgas pri la regula kaj sukcesa aranĝado de la ĉiujaraj internaciaj Kongresoj esperantistaj. Ĝi konsistas el 2 partoj :

a) parto *konstanta*, elektota de nun ;

b) parto *okaza*, kiu estas ĉiujare la grupo esperantista en tiu urbo, kie devas en tiu jaro havi lokon la Kongreso. Por ke la aranĝado de la Kongresoj ne trovadu sin ĉiufoje en manoj novaj kaj tute ne spertaj, ĉiuj rimarkoj, konsiloj kaj helpoj por la Kongresoj devas ĉiam esti direktataj al la *konstanta prezidanto* de la Komitato, kaj tiu ĉi lasta jam transsendas ĉion al la parto okaza, t. e. al la organizantoj de la Kongreso en tiu jaro.

14. — La Komitato de Cenzuristoj zorgas pri la pureco de la lingvo en la eldonaĵoj verkoj esperantaj, por doni al la leranto j de Esperanto garantion kontraŭ la uzado de malbonaj libroj, kiuj instruas tute eraran lingvon kaj enkondukas grandan kaj nerebonigeblan konfuzon en la aferon de Esperanto. La Komitato konsistas el 25 personoj, kiuj posedas bone la lingvon Esperanto. Ĉiu aŭtoro, kiu deziras ke lia verko havu oficialan aprobon, devas peni, ke la manuskripto de la verko estu legita kaj aprobita de ne malpli ol 2 membroj de la Komitato de Cenzuristoj. Tiam li havas la rajton presigi sur sia verko la aprobon de la Ligo, tamen kun la nepra publikigo de la nomoj de tiuj cenzuristoj, kiuj aprobis la verkon.

Rimarko. — Ĉar la aprobado de la Ligo ĉesigos la ĝisnunan aprobadon de L. Zamenhof kaj tio ĉi povus nejuste kaŭzi perdojn al la firmo Hachette kaj Kie kaj ĝiaj diverslandaj reprezentantoj kiuj, havante de L. Zamenhof promeson de rekomendado, elspezis jam multe da mono por progresigado de la Afero Esperanta, tial la Ligo havas la rajton aranĝi cenzuradon kaj aprobadon nur en tiu okazo, se ĝi antaŭe interkonsentas pri tio ĉi kun la firmo Hachette kaj Kie kaj ĝiaj reprezentantoj kaj se la diritaj firmoj, ricevinte de la Ligo ian privilegion, liberigos la aŭtoron (de la lingvo de la promesa korektadi kaj aprobadi la verkojn, kiujn ili eldonas.

15. — La Komitato de Ekzamenistoj okupas sin je ekzamenado de personoj, kiuj deziras ricevi oficialan certigon, ke ili posedas bone la lingvon Esperanto. La Komitato konsistas el 25 personoj, kiuj posedas bone la lingvon Esperanto. Ĉiu, kiu deziras ricevi diplomon, devas traduki en Esperanto ian verkon, enhavantan de 10.000 ĝis 15.000 vortoj, aldoni la certigon per vorto de honoro, ke li faris la tradukon tute memstare, sen ies helpo aŭ korekto, kaj prezenti ĉion al 2 membroj de la Komitato de Ekzamenistoj. Se la ekzamenistoj subskribas sub la tradukita verko, ke ili trovis ĝin « senerara sed ne perfekte bonstila », tiam la tradukisto sendas la tradukitan kaj la certigon al la prezidanto de la Komitato kaj ricevas de li « Diplomon Esperantan de la dua grado. » Se la ekzamenistoj subskribis, ke la tradukos estas « senerara kaj perfekte bonstila, » tiam la ekzamenisto ricevas « Diplomon Esperantan de la unua grado ». Sur ĉiu diplomo estas subskribitaj la prezidanto de la Komitato de Cenzuristoj kaj la 2 ekzamenistoj. Por la diplomo la kandidato pagas al la prezidanto de la Komitato 10 frankojn, kaj la prezidanto transdonas tiun ĉi sumon en la kason de la ligo. La nomoj de la diplomitoj estas presataj en la Centra Organo.

16. — En la nuna Regularo, la Ligo havas la rajton faradi ĉiajn necesajn ŝanĝojn, elĵetojn, aŭ aldonojn aŭ eĉ anstataŭigi la tutan Regularon per ia alia per decidoj de la Centra Komitato sankciitaj de la Kongreso konforme al la paragrafo 7 de tiu ĉi Regularo.

(daŭros)

« LA MARSEILLAISE »

En *Lingvo Internacia* de 15a de Junio, Dro Zamenhof skribis :

« Estus bone ke la esperantistoj scios pri kiere la tradukon esperantan de la franca nacia himno ke la esperantistoj, gastitoj de Francujo, kantos sendube en la Bulonja kongreso.

Respondante al tiu deziro ni publikigas ĉi sube la tradukon de *La Marseillaise* faritan de anglo, Sº Ben Elmy. Ĝi estas kantita je l'honoro de Francujo, dum vizito de grupo de anglaj esperantistoj al iliaj samideanoj de Havro, la lastan jaron.

I

Alvenu, ho patrujinfanoj !
Nun estas nia glora tag' ;
Jen, kontraŭ ni de la tiranoj
Leviĝas sangminaca flag' : *(bis)*
Ĉu aŭdas vi en la kamparo
Kruelajn bruojn de soldat' ?
Li portas morton sen kompat'
Al la edzin' kaj junularo.

Rekanto.

Landanoj, armu vin !
Batalu en kombin' !
Ni marŝu, ke l'malpura sang'
Fluadu ĝis la fin' !

II

Do kion volas sklavamaso,
La perfidulaj kaj la reĝ' ?
Por kiu tiom da frakaso,
La feraj ĉenoj, fera leĝ' ? *(bis)*
Al vi, ho Francoj, l'insulteco
Asignas tion, ankaŭ pli
Meditas ke deviĝu vi
Eĉ al antikva la sklaveco !

Rekanto.

Landanoj, armu vin ! kc.

III

Tiranoj, tremu, perfidantoj,
De l'homo kaj parti degrad' !
Post provoj patromortigantaj,
Vin sekvos honto kaj punad' ! *(bis)*
Ni ĉiuj volas vin batali ;
Se falos iu per la mort',
Francujo kontraŭ lia sort'
Alian naskos rebatali.

Rekanto.

Landanoj, armu vin ! kc.

Praŭlo de Esperanto

En XIa jarcento de l'Hegiro, lingvo universala estis kreata sub komando *Talajbalan* de Araba sheiko Mohij-ed-Din. Kiu povos doni informojn pri ĝi ?

Estus bone memorigi pri tio en propagando al Arabuloj.

Bruoj

Parolas homo, papago, sturno...
Krias, kantas, fajfas homo kaj birdoj ;
Pepas birdetoj ;
Blekas kvarpeduloj ;
Bojas hundo, ĉakalo ;
Miaŭas kato ;
Zumas insektoj ;
Siblas serpento, sago, ardanta fero en akvo ;
Muĝas maro, vento, huragano ;
Murmuretas riveretoj, kolomboj, katoj, folioj ;
Grincas pordoj, feraĵoj, dentoj ;
Balbutas infano, timegemulo ;
Ronkas netolerebla sinjoro ;
Babilas virinoj, kaj aliaj.

Enfine

Silentas...

l'Aŭtoro.

Avizo

Nia sindonema samideano Sro Narat de Auxonne petas nin publikigi lian adreson dum la libertempo (augusto kaj septembro). Jen ĝi estas :

Sro A. Narat, rue JJ. Collenot, Semur (Côte-d'Or-Francujo).

¡ LA CENTA !

Kvankam oni aĉetas « Esperanto » precipe po numero, kelkaj samideanoj deziris aboni la gazeton. Baldaŭ ni ricevos la *centan* abonpagon : kiu estos tiu amiko ? Ni ne scias ĝis ni mem ne povas tion anuncividi. Kiam prestigas tiu jurnalo ni ne jam konas lin, sed ni scios lian nomon antaŭ la fino de la semajno, ĉar ni ricevas ĉiutage abonojn. Nu ! ni numerigas zorge ilin, laŭ la ordo de ricevo kaj, al tiu kiu ricevos la nea 100, ne nur ni resendos la abonpagon, sed ni faros beletan donacon esperantistan.

Kiu estos la Centa ?

Erareto

En nia lasta numero, kol. 3 en artikolo *Ekskurso en Saint-Germain-en-Laye*, la kompostisto iom miksis la nomojn de la ĉeestantaj prezidantoj. Oni volu legi :

« La apudaj parizaj grupoj partoprenas : Sro Joannis, profesoro ĉe Sorbonne, prezidanto de l'grupo Versailles ; Dro Hugo Schweitzer, prezidanto de l'Grupo Provins ; Sro Jouanneau, prez. de l'Grupo de l'arondisona Kantono ; Sro Corret, sekretario de l'grupo Versailles. »

Kaj volu nin pardoni la anoj de l'Charentona grupo, kiun ni neintence senigis de ilia simpatia estro.

DIVERSAĴOJ

La Kongreso

Sabaton 6an de Aŭgusto, *je la oka vespere*, ĉe la Urba Teatro, poloma malfermo de la kongreso, antaŭ la urbestraro, la komerca magistrato kaj reprezentantoj de la Franca turista klubo. — Oficialaj paroladoj. — Koncerto.

Lasthore ni ekscias ke diversaj esperantanoj intencas elvoki malpacon en la kongreso pro monaĵ kaj komercaj demandoj. Ni estas certaj ke la kongreso ne lasos sin maltrankvilig per tiaj demandoj kaj scios per sia energia starado devigi ĉiun al la respekto meritita de nia glora majstro Zamenhof.

Nenta aludo, nenia hipokrito, nenia kalumnio povos kredigi al ni ke la homo, kiu, kreinte l'aferon kaj subteninte ĝin dum tiom da tempo por siaj proprajrimedoj kaj energio, donis al la mondon tian modelon de genia prudento kaj saĝo, subite pro neindaj profitoj volus min kondukti al pereo nun, li sanu kiu nin kondukis dum dek ok jaroj al la venko !

Ekskurso de Esperantistoj en Joigny

La grupanoj de Auxerre kun tiuj de Sens faris ekskurson en Joigny la dimanĉon 2an de Julio. Ni estas ĉirkaŭ 40 ĉe gen-Auxerre-anoj, inter kiuj la afabla Prezidanto Cestre. Ĉi tiu alvenis preskaŭ samtempe ĉirkaŭ la 11a. Niaj grupanoj profitis la subarban atendadeton por prezenti al sia kortuŝata profesoro (ni mem ! multe tro belan donacon. Oni konatiĝis, gajege kunmanĝis en belega ĉambrego de l'Hotelo de la Poŝto. Oni ludis fortepiano kaj violonaro la belan Valson *Esperanto* de De Ménil, kantis *Almozpeton* de De Ménil ankaŭ, kaj ludis kaj kantis aliajojn neesperantistajn, kaj promenis tra l'bela monta urbeto, kaj sur herbejo apud larĝa rivero Yonne rondeton ĉis, kaj malfruigis Auxerre-anojn, kiuj volis forveturi tro frue, fine samtempe revenis stacidomen, sekvante la violonaron junulaĉon antaŭe ludantan. Joigny ne povas plu nescii la verdan stelon.

R. DESHAYS.

Pri nia jurnalo

« Ni jus ricevis unuan numeron de nova gazeto *Esperanto*... Ni aparte ŝatas krom la interesa enhavo, la rimarkindan bonan stilon de la unua numero. »

(Germana Esperantisto).

IV

Patruja Amo, sankta, pia,
Konduku nin, kun venĝa man'
Ha Libereco, kara nia,
Klopodu kontraŭ la tiran' ! *(bis)*
Alflugu Venko kun favoro
Al nia helpo sub standard' ;
Kaj estu tie en rigard',
Triumfo ĝia, nia gloro !

Rekanto.

Landanoj, armu vin ! kc.

Trad. BEN ELMY.

LINGVAJ KLARIGOJ

de Dr ZAMENHOF

Elparolado de ŭ kaj j.

Pri la literoj *u* kaj *ŭ*, *i* kaj *j*. — Kelkaj amikoj ne tre bone komprenas kaj ne regule uzas la literojn *u*, *ŭ*, *i* kaj *j*. Laŭ ilia opinio (esperanta ĉeĉo en kelkaj lernolibroj) la literoj *u* kaj *i* kune kun antaŭŭrantaj vokaloj farus « duoblan vokalon » ; ili sekve elparolas *au* kiel *aŭ*, *ei* kiel *ej*, ktp. Tio ĉi estas *eraro*. En nia lingvo ne ekzistas duoblaj vokaloj, sed ĉiu litero estas elparolata ĉiam egale kaj ĉiam aparte. Sekve oni devas leĝi « ba-lá-u, tra-ú-lo, tro-ú-zi, de-i-ri, krú-i-hero-i-no » *kaj ne* « bá-laŭ, tráŭ-lo, troŭ-zi, déj-ri, kréj, herój-no » kiel faras multaj germanoj, havantaj tiun ĉi kutimon en sia lingvo. La literoj *u* kaj *i* devas ĉiam esti elparolataj klare kaj aparte, kiel ĉiu alia litero.

Sed ekster *u* kaj *i* en nia lingvo ekzistas ankoraŭ la literoj *ŭ* kaj *j*, kies elparolado estas simila al la elparolado de *u* kaj *i*, sed pli mallonga kaj ne prezentanta silabon (kiel konsonanto) ; se ili staras post vokalo, ili estas elparolataj kun ĝi en unu silabo kaj tial faras *impreson* de duobla vokalo. La literoj *ŭ* kaj *j* ĉiam ankaŭ estas elparolataj aparte, sed ili ĉiam estas *konsonantoj*, tute egale ĉu ili staras antaŭ vokalo aŭ post vokalo. Sekve oni devas legi : « ja-ro, jus-ta, krajo-no, fráŭ-lo, Eŭ-ro-po, fój-no, páj-lo, *kaj ne* « i-a-ro, i-us-ta, kra-i-o-no, fra-ú-lo, E-u-ro-pó, fo-i-no, pa-i-lo ». Se ni la germanajn vortojn : *Säfte, Traube* volus okribi per ortografio Esperanta, ni devus skribi : *Zajte, Traŭbe*. La vorto *laŭta*, ekzemple, estas dusilaba kaj ne trisilaba, sed ne pro la kaŭzo ke aŭ estas kvazaŭ duobla vokalo, sed nur ĉar ŭ estas konsonanto (dum ŭ estas vokalo).

El *Esperantisto*. Januaro 1893.

Rim. — Konsekvence de tio estas ke la nomoj de la literoj **u** kaj **i** estas *u* kaj *i* dum la nomoj de la literoj **ŭ** kaj **j** estas *ŭo* kaj *jo*, laŭ la regulo de aliaj konsonantoj.

La Artikolo

Se vi ne scias, kiam vi devas uzi la formon *la* kaj *l'*, uzu ĉiam pli bone la formon *la*. La formon *l'* mi uzas ordinare nur post prepozicioj, kiuj finiĝas per vokalo (ekzemple *de*, *je*, *tra*, k. c.) en ĉiaj aliaj okazoj mi uzas ordinare la plenan formon *la*, ĉar alie la senco povus fariĝi ne klara, eĉ la sono ne agrabla.

El *Esperantisto*. Decembro 1889.

Ofte vi ripetas pri la maloportuneco de la artikolo *la*. Sed la artikolo estas ja vorto tute aparta kaj sur la konstruon de la frazo ĝi havas nenian influon ; tial se vi volas, vi povas tute ĝin ne uzadi, almenaŭ ĝis la tempo kiam vi tute bone scios ĝian signifon.

El *Esperantisto*. Februaro 1890.

POSTULU ! POSTULU ! POSTULU !

★ ESPERANTO ★

en ĉiuj librejoj kaj jurnalejoj.

PRI LA VORTARETO

Mi ricevis multegon da leteroj pri tiu unua provo de leksikono esperanto-esperanta. Mi dankas fervore ĉiujn kaj bonvolas sendi al mi ŝiajn konsiloj kaj rimarkojn. Mi ne povas enpresi ĉiujn, sed estu certaj, karaj kunlaborantoj, ke mi ilin plene utiligos en la libro kies tio ĉi estas nur antaŭlabero.

Jen unu el tiuj leteroj :

Tre Estimata Sinjoro,

Permesu al mi kelkajn rimarketojn pri via bona kaj utilega *Vortareto Esperanto-Esperanta*.

1a *abato*. La Francoj prenis la malbonan kutimon nomi abatoj la personojn kiuj apartenas al la Katolika Eklezio. Tio estas bedaŭrinda konfuzaĵo. Ili devus diri *kleriko* (latine *clericus*) ; tiu vorto estas en la Esperanto-Germana Vortaro.

2a *abomeni* : la abomeno kaŭzas ke ni celas forigi de ni tion, kion ni abomenas ; la malamo igas nin kontraŭbatali la malamaton.

3a *abrupta*, vertikala, kruta esprimas preskaŭ la saman objektivaĵon sed laŭ diversa subjektiva vidopunkto. Vertikala estas ĉio, kio estas malhorizontala ; tiu vorto estas nure objektiva. En krutaĵo ni rimarkas la deklivon. Abrupta ŝajnas loko, kiam la ebenaĵo supra estas kvazaŭe subite *rompita* kaj defalanta kruta kaj preskaŭ vertikale.

4a *absoluti* : purigi (aldonu : de la kulpigo).

5a *adnokato*. L'advokato diferencas de l'aferisto, ĉar l'advokato estas difinita precipe por paroli antaŭ juĝistaro aŭ juĝantaro.

6a *akcepti*. La verbo *ricevi* montras ke oni alprenas tion, kio alvenas, estas donita, proponita, k. t. p. Sed *akcepti* montras la manieron de la ricevo, la spiritan staton de l'ricevanto ; ordinare *akcepti* havas favoran sencon.

7a *akompani*. Kiam du personoj kuniras, la akompanato estas kvazaŭe ĉefo de la kuriranto, la akompananto estas male la malĉefo. Pardonu al mi tiujn rimarketojn, kiuj pruvas nur kiom multe mi ŝatas vian akuratan kaj scienceplenan verkon,

Kore via,

C. H.

Hodiaŭ manko de loko malpermesas daŭrigon de la vortaro, sed ĝi regule aperos post la Kongreso.

P. BERTHELOT.

LETERFAKETO

Al Kelhaj. — Nenian rabaton ni faras sur la elvendiaj numeroj, t. e. tiuj kiuj eltiris antaŭ la laste eldonita. De nun, la nro unua estas aĉetebla nur po 25 centimoj.

Sro *X, el Grenoblo.* — Tri gazetoj samtempe prenis tiun nomon *Esperanto*, hungara, ruso kaj franca. Jam antaŭe hispana havis tiun saman. Sed ni kredas ke tio alportos nenian embarason, se oni zorgas diri : *Esperanto rustinguna*, ktc. parolante pri tiuj gazetoj.

Nimes. — Sro Allot, 22, rue de Turenne deziras rilatiĝi kun geesperantistoj en Nimes, en celo fondi grupon.

ONI POVAS AĈETI LA GAZETON

ESPERANTO

en ĉiuj stacidomoj francaj kaj svisaj

SPRITAĴETOJ

Teorio kaj praktiko.

Arturo. — Mi povas elekti inter malriĉa junulino, kiun mi amas, kaj riĉa vidvino, kiun mi ne amas. Kion vi al mi konsilas, Frederiko ?

Frederiko. — Li' amo estas la salo de l'vivo. Sen ĝi, ĉio estas vanta. L'amo faras malriĉecon riĉeco, penadon ĝuado, teron ĉielo.

Arturo. — Sufiĉe

PREMIÈRE ANNÉE. — N° 4. Le Numéro : 10 CENTIMES. DIMANCHE 30 JUILLET 1905.

★ ESPERANTO ★

JOURNAL DE PROPAGANDE POUR LA LANGUE AUXILIAIRE INTERNATIONALE

DE L. L. ZAMENHOF

ADMINISTRATION : M. Paul BERTHELOT, CÉRET (Pyr.-Or.) France. N'envoyer aucun manuscrit à l'Administration.

RÉDACTION : M. CH. LAMBERT, 10, rue Berbisey, DIJON (Côte-d'Or). N'envoyer à la Rédaction rien de relatif à l'Administration.

ABONNEMENTS : 24 numéros consécutifs, 3 fr. pour le monde entier. 10 abonnements à la même adresse : 25 fr.

PUBLICITÉ-ANNONCES : Agent Général : M. EMILE GASSE, 71, Plaisbourg, LE HAVRE (Seine-Inférieure).

Le numéro 5 de **Esperanto** *paraîtra DIMANCHE 6 AOUT*

LE RAPPORT

De M. ALBIN ROZET

M. Rozet n'aime pas l'esperanto. C'est son droit. Mais il en parle avec une désinvolture et une ironie qui n'étaient peut-être pas de mise.

« L'allemand *tag* fait *tago*, dit-il, et devient sous ce déguisement néo-latin, méconnaissable aux compatriotes même de Goethe et de Schiller (1). » Voilà qui est spirituel, n'est-ce pas? Assurément, si j'espérantisais son nom en *Rozeto*, M. Rozet ne comprendrait pas que je parle de lui.

